INTERNA REGLAMENTO DE BENINA ORGANIZO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ (BOJE)

I : ***GXENERALAJXO***

1.1 La aligxo al Benina Organizo de junaj esperantistoj (BOJE) estas libera kaj volonta sed post pago de aligxkotizo de 1000 f cfa (500f cfa en la kaso kaj 500f cfa por la pago de membrokarto cxe ABeE).
1.2 Cxiuj membroj de BOJE devas :
- a- bone regi la statuton kaj internan reglamenton de BOJE
- b- akurante pagi sian kotizon
- c- aktive agadi por defendi materialojn kaj moralajn interesojn de BOJE
- d- konformi al la reglamento de la Organizo
- e- subteni la celojn de TEJO

1.3 Cxiu membro kiu konformigxas al la enhavo de artikolo1.2 rajtas baloti kaj esti elektata je iu ajn posteno de la sekcio.

II : ***STRUKTURO KAJ FUNKCIADO***

1.4 La estraro estas la plenumorgano de BOJE
1.5 Cxiu estrarano devas scipovi esperanton
1.6 La membroj de BOJE devas esti kapabla kunlabori, rilati kun aliaj organizoj kun sama celo, kapabli sola labori.
1.7La prezidanto de BOJE konvokas kaj gvidas kunvenoj de la estraro. Li ordonas elspezojn , tiucele necesas ankaux subskribo de la kasisto
.8 La Gxenerala Sekretario respondecas pri libro-tenado, protokoloj de kunvenoj, arkivoj kaj korespondajxoj de BOJE
1.9 La prezidanto respondecas pri posedajxo de BOJE

III *:* ***FINANCOJ***

1.10 La kasisto zorgas pri kotizoj cxiuspecaj de BOJE
1.11 La kasisto devas esti kapabla disponigi liston de la monfluo cxiumonate
1.12 Pri neantauxvidataj elspezoj respondecas nur la Prezidantopost peto de opinio cxe la ceteraj estraranoj. Pri cxiu misuzo de la sekcio-havajxo kulpas nur prezidanto ordonos.
1.13 La kasisto respondecas pri arkivigxo de financaj dokumentoj, kiuj devas laux peto de iu ajn membro de la estraro esti je dispono de iu ajn membro de BOJE.
1.14 La mono de BOJE devas esti deponata kaj gxiranta en banko.
1.15 La kasisto rajtas havi pli ol 50.000 f cfa.
1.16 La kasisto devas dauxre aktualigi la staton de la financo.

IV : DISCIPLINO

1.19 Bazaj principoj de demokratio, tio estas akcepto de la decido de la plimulto estu rigore observataj.
1.20 Cxiu malordo kontraux bona etoso de la funkciado de BOJE kaj ties celoj okaziga eksigon de ties ordonanto kaj aganto.
1.21 Jenoj estas konsiderataj kiel malordoj de BOJE :
- a- malakcepto de la decido de la plimulto
- b- engagxigo de la Organizo en ia ajn afero sen antauxe permeso de la estraro
- c- kalomnio per sia konduto de BOJE kaj ties strukturoj
- d- misuzo de aux sxtelado de la havajxo de BOJE
- e- cxiu ajn konduto, kiu ebligas malordon kaj moralan malkonsideron por BOJE

1.22 Cxiu ne-respekto al la statutoj kaj interna regularo okazigas jenajn sankciojn :
- a- averton
- b- admonon
- c- provizoran eksigon
- d- eksigon

1.23. Post opinio de la gxenerala asembleo la estraro ekzekutas la sankciojn.
1.24. Nur la gxenerala asembleo rajtas aldone kompletigi aux sxangxi tiun-cxi regularon.

Lokossa, la 9-an de Septembro 2006.

La Gxenerala Asembleo

STATUTO DE BENINA ORGANIZO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ (BOJE)

1**. Nomo kaj celoj**

1.1 La nomo de la civitana asocio estas (traduknoto : en la franca lingvo) ‘’BOJE-Organisation béninoise des Jeunes Espérantistes (citote kiel ‘’BOJE’’) ; BOJE uzas krom la kompleta nomo ankaux la nomon sen la mallongigo : ‘’Organisation des Jeunes Espérantistes’’, Esperantan tradukon de la nomo : ‘’Benina Organizo de Junaj Esperantistoj’’, aux nur la mallogigo : ‘’BOJE’’.

1.2 Celoj de BOJE estas :

a. subteni la internacian lingvon Esperanto kiel rimedo por internacia komunikado,
b. informi junajn homojn en Benino pri Esperanto,
c. iniciati kaj subteni projektojn pri internacia kunlaboro de junaj homoj kun eluzo de la lingvo Esperanto,
d. kunlabori kun organizajxoj, kies celoj kongruas kun tiuj de BOJE.

1.3. La sidejo de BOJE estas en Lokossa, BP 416 Lokossa, Rép. Du Bénin, retadreso : tejobenin@yahoo.fr. La sidejo de BOJE cxiun momenton moveblas cxien laux la decido de la Gxenerala Asembleo.

2. Membreco

2.1. Cxiu fizika persono agxanta 15 jarojn aux pli, aux jura persono konsentanta kun la statutoj, povas igxi regula membro de BOJE. La membreco estigxas tage de la enskribo en la membrolisto, tenantan far la estraro. La nova membro de estas enskribota paginte la membrokotizon.

2.2. Fizika aux jura persono agxanta malpli 15 jarojn aux morala persono povas igxi infana membro de BOJE. La infanaj membroj ne havas vocxdonrajton cxe la gxenerala asembleo. Tage de agxigxo je 15 jaroj, la infana membro auxtomate igxas regula membro de BOJE.

2.3. La membreco de BOJE malestigxas per :

a. memvola decido de la membro anoncita al estraro,
b. nepagado de la membrokotizo dum pli ol unu jaro,
c. forpaso de la membro,
d. malfondigxo de BOJE

2.4 La regula membro devas:

a- respekti la statuton de BOJE
b- pagi la jaran membrokotizon
c- esti aktiva
d- helpi en la realigo de de la agado

2.5 Se la membro agas malkongrue al celoj kaj planoj de BOJE aux damagxas al gxia reputacio, la estraro povas konvoki la asembleon por decidi pri eventuala malmembrigxo. Tamen la membro povas ankoraux apelacii kontraux la malmembrigxo al la sama Asembleo.

3. **La Asembleo**

3.1 La Asembleo estas la plej alta organo de BOJE. Gxi kunvokatas minimume unu foje jare.
3.2 La Asembleon kunvokas kaj gvidas la Prezidanto de BOJE, aux la persono kiun pri tio komisias la prezidanto de BOJE.

a- La tempo kaj la loko de la realigo de la maleksterordinara Asembleo devas esti anoncita al cxiuj membroj almenaux 30 tagoj antauxe.
b- Pro postulo far la plimulto de la estraro aux far almenaux unu triono de la membraro de BOJE devas eksterordinara Asembleo **esti kunvokita gxis 30 tagoj ekde la prezento de la postulo.**

3.3 La Asembleo estas decipova, se cxeetas almenaux 20 de la membraro.
3.4 Cxiu regula membro cxeestanta cxe la Asembleo havas unu balotvocxon.
3.5 La Asembleo per dutriona plimulto da vocxoj:
a- akceptas kaj sxangxas la statuton de BOJE
b- decidas pri malfondigxo de BOJE kaj gxia havajxa finordigo, kaj fiksigas la likvidanton,
c- malelektas la estraron aux gxian unuopajn membrojn,
d- estigas kaj malestigas certerajn organojn
e- decidas pri apelacio de la membro kontraux mlmembrigxo.

3.6 La Asembleo per simpla plimulto da vocxoj :

a- elektas estraranojn,
b- fiksas la membrkotizojn
c- aprobas la bugxeton.

3.7 Gxenerala Asembleo konsistas el :
b- la estraro
c- la membroj de BOJE
d- simpatizantoj por esperanto

4. La estraro

Gxi konsistas el kvin postenoj:

4.1 La estraro kunordigas la agadon de BOJE, kaj dum la tempo inter Asembleoj gxi estas la plej alta organo de BOJE. Gxin elektas la Asembleo por funkciperiode de 2 jaroj. La estraro havas almenaux 3 membrojn. Dum neekzistado de la estraro gxiaj rajtopovoj transiras al la Asembleo.

4.2 Estrarani nur povas plenagxa (traduknoto: laux la Benina legxo tio estas almenaux 18-jara) regula membro de BOJE kiu tage de la elekto agxas malpli ol 30 jarojn. La membro povas esti elektita estrarano por ne pli ol 3 sinsekvaj funkciperiodoj.

4.3 La estraro realigas jenajn aferojn :

a- konsistigas la agadplanon kaj bugxeton, kiujn gxi prezentas por aprobo al la asembleo aux aprobigas ilin per alia tauxga maniero,
b- organizas la realigon de la agadplanon kaj solvas rilatajn teknikajn problemojn.

4.5 La estraro decidas per simpla plimulto. Por valideco de jura ago estas bezonata aprobo far la prezidanto.

5. Mastrumado

5.1 enspezfontoj de BOJE estas precipe membrokotizoj, donacoj, grantoj kaj monsubvencioj.
La havajxo povas esti uzata por akirado de la celoj de BOJE kaj por prizorgo de gxia propra agado.
5.2. Pri mastrumado de la havajxo respondecas la kasisto de BOJE, aux la persono komisiita pri tio far la estraro.
5.3 Kaze de malfondigxo de BOJE de la asembleo per unuigxo kun iu alia civitana asocio, la tuta havajxo de BOJE transiras al tiu asocio. Kaze de alimaniera malfondigxo de BOJE, la havajxo transiras al unu aux pluraj civitana(j) asocio(j) kies celoj proksimas al celoj de BOJE.

6. Provizoraj reguligxoj

6.1 Tage de estigxo de BOJE la membroj de la preparkomitato auxtomate igxas membroj de la estraro. La funkciperiodo de tiu estraro estas unu jaro.

Lokossa, la 9-an de septembro 2006.

La Gxenerala Asembleo.